EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

## Enhavo


- AMO 65 ekis – granda interesiĝo
- Temo 'Landaj Asocioj'
- La enkonduka prezentaĵo
- Raportoj el LA LA-lando


Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-35 sendita el Budapeŝto, la 27an de junio*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# AMO 65 – Landa Agado esencas

La 65a seminario de Aktivula Maturigo ekis antaŭ deko da minutoj. Denove la teknika prizorgo de tiu virtuala seminario estas en la manoj de niaj iranaj kolegoj. La temo por tiu seminario estas:

## 'Landaj Asocioj – Leviĝantaj Agantoj' – nia propra LA LA-lando

Efektive tiu deziro por niaj kernaj landaj agantoj spegulas pli niajn esperojn ol la nuntempo. Ja ni havas kelkajn ekzemplojn pri elstare agantaj asocioj, sed multaj aliaj nebone funkcias aŭ eĉ preskaŭ malaperis. La Kontinentaj Komisionoj nepre devas levi sin por aktive helpi al tiuj malfortaj elementoj en nia ĉenaro de Landaj Asocioj. Tio same validas por la Landaj Sekcioj de TEJO- precipe tiujn en Eŭropo, kie plej akutas la bezono por rejunigo de la membraro. Pri tio kaj multo pli rakontas la alkroĉitan enkondukan prezentaĵon de Stefan MacGill. Post tio sekvis bela prezentita 7-minuta vidbenda salut-parolo de Jeremie Sabiyumva, la estrarano de UEA pri AMO.



=============== vortoj: 155 ==============

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/18. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.